

Demokratio kaj lingvo-justeco

2a parto, Lucas Rivière

Kio estas lingvo-justeco?

1. **Demando**: Laŭ vi, kio estas la lingvo-justeco?

Lingva justeco klopodas ke **Ĉiuj komunumoj havu la samajn ŝancojn kompreni kaj partopreni nian socion**, pledante por diversa kaj vere inkluziva socio, kie plurlingvaj komunumoj ricevas la ilaron por partopreni kaj kompreni samrajte. Ĝi ankaŭ pledas por socio kie **la rajto komuniki en sia preferata lingvo estas konsiderata kiel homa rajto**, kiu estas plene jure protektata kiel fundamenta komponanto de vera parolibereco (Irene Gotera, Linguistic Justice NYC).

Lingva justeco estas relative nova, sed kreskanta interfaka studkampoj. Dum kelkaj teorioj interesiĝas pri la subtenado de **lingva diverseco**, aliaj donas plian gravecon al aliaj temoj, kiel egaleco de ŝancoj aŭ al la diversgrada redukto de malegalecoj pere de Esperanto aŭ de la angla kiel lingvafankao.

2. **Demando**: Ĉu vi havas ekzemplojn de lingvo-**mal**justecoj?
3. **Demando**: Ĉu vi jam travivis lingvo-maljustecon en via persona vivo?

Ekzemploj de lingvo-maljusteco

1. **Unuiĝintaj Nacioj**

La ONU organizis grandan kaj tutmondan debaton, kiu devintus diskuti la rolon de internacia kunlaboro - sed la debato disponeblas nur en la angla.

2. **Bolivio**

Ajmaroj parolas pli ol 20 apartajn lingvojn, ĉiu el kiuj estas teorie akceptita de la ŝtato. En la praktiko, preskaŭ nenio estas farita por reklami ilin kaj igi ilin videblaj en la publika sfero. La kampoj de edukado, reklamado, politiko kaj amaskomunikiloj estas ekskluzive en la hispana lingvo.

3. **Madagaskaro**

En Madagaskaro neniu povas peti postenon en la nacia lingvo (malgasa aŭ madagaskara), eĉ por esti sekuristo, aŭ skribi ĉekon, ĉio devas esti en la franca. Estas baro al la evoluo de Madagaskaro devigi homojn paroli la francan ĉar la plej multaj homoj tute ne regas ĝin.

Pli da informo

4. [EO] [Defendu viajn lingvajn rajtojn!](http://lingvaj-rajtoj.org), lingvaj-rajtoj.org
5. [EN] [Esperanto and linguistic justice](#), Language Communication Information (JKI), JKI-12-2017[1], paĝoj 142-143.
6. [EN] [About linguistic justice](http://linguisticjusticeennyc.com), Irene Gotera, linguisticjusticeennyc.com